TEJO-aktuale: numero 387, 2014-08

**[Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)] Ofte homoj havas grandan entuziasmon kaj agademon, sed foje ili bezonas ion pli por plene esprimi sian potencialon por efike agadi kadre de sia organizo.**

*Malsukcesa elŝuto.*

### 30-aj ARtaj KONfrontoj en ESperanto "ARKONES", Poznań, Pollando, 26a ĝis 28a de septembro 2014

Ĉu vi pretas dediĉi la lastan septembran semajnfinon al E-kulturo, arto kaj scienco?
1. Programo
Kristaliĝas programo de ĉi jara Konfrontoj. Ĝi estos plena de prelegoj, koncertoj, prezentaĵoj kaj elpaŝoj. Indas viziti nian retejon por legi la plenan programon en ĝia aktuala formo. La granda stelulo de la Miela Vespero estos grupo KAJTO.
Aktualigata programo troveblas en nia retejo. Ni daŭre akceptas programkontribuantojn kaj premias ilin per 50% rabato de la kotizo.
2. Tria Interlingvistika Simpozio 25-26.09
Problemoj de internacia lingva komunikado kaj iliaj solvoj. Indas kombini sian partoprenon en "ARKONES" kun tiu grava evento. Partopreno estas senkosta. Detaloj kaj aliĝo:
http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/simpozio2014.html
Interlingvistikaj Studoj: nova starto. Nova starto de la plej kompletaj studoj pri Interlingvistiko, kiu funkcias ekde 1998. En septembro 2014 startos nova grupo. Kandidatoj el la tuta mondo estas bonvenigataj. Postulo: bona kono de E-o (min. nivelo B2) kaj baza kono de E-kulturo, baza diplomo pri superagradaj studoj. Aliĝdato: 15.08.2014. La unua sesio okazos inter la 20-24.09.2014.
Informoj: http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/index.html
3. Aliĝo kaj loĝebloj
Eblas aliĝi malmultkoste antaŭ la aranĝo pere de la reta aliĝilo:
http://www.arkones.org/partopreno/aligilo
Kotizoj ekde 15 eŭroj (45 zł por poloj). Pluraj rabatoj!
Loĝigo en Junulargastejo Cinnamon ekde 5 eŭroj inklizive matenmanĝon.
Ne forgesu inviti nianome aliajn esperantistojn en via urbo.
Amike via, Tobiasz Kaźmierski, +31-641010695, http://www.arkones.org

### Universala Kongreso 2016 okazos en Nitra, Slovakio

Laŭ decido de la komitato de UEA la 101a Universala Kongreso en 2016 okazos en Nitra, Solvakio.

### Informoj pri FESTO

- [FESTO 2014] Ekzistas ĉi-jare karavano al FESTO! Rigardu en la retejo: http://www.alesk.eu/festo2014/loko/lieu/

- Tre baldaŭ okazos FESTO, nur kelkaj tagoj por aliĝi, rapidu !!!
https://www.facebook.com/groups/405914452876113/ aŭ http://www.alesk.eu/festo2014

### Prelego-turneo de Mikaelo Lineckij en Germanio (ekde 24a de aŭgusto)

La konata esperantisto Mikaelo Lineckij el Kievo, la ĉefurbo de Ukrainujo, venos fine de aŭgusto al Germanujo por prelegi en lokaj kluboj. Vi povas inviti lin ekde la 24-a de aŭgusto; ankoraŭ ne certas la fina tago de lia restado, eble estos la 5-a de septembro.

Li preparis plurajn prelegojn:

1. Ukrainaj popolaj kantoj kun la instruado

2. Uzo de ludoj dum E-kurso kun la parktiko

3. Novaj metodoj por netradicia kuracado

4. Logikaj taskoj por paroliga kurso kun la trejnado

5. Popularaj diverstemaj anekdotoj

6. La aktuala situacio en Ukrainujo

Ĉi-lasta temo aparte taŭgas ankaŭ por ĝenerala publiko.

Detalojn pri la gasto vi trovas sur http://turneoj.wikispaces.com/Lineckij+2014

Bonvolu gastigi lin laŭ la kondiĉoj de Pasporta Servo. Kiel kontribuon al la vojaĝkostoj mi petos 30 EUR. Se via klubo ne povas pagi tion, ne hezitu tamen skribi al mi kaj ni trovos solvon.

Amike salutas, Lars Sözüer, komisiito de GEA pri rondvojaĝoj, http://turneoj.wikispaces.com/

### Esperanto-monato 2014: Novembre

La celo de Esperanto-Monato estas ke dum unu monato (kutime novembro) aŭ parto de la monato, vi afiŝu ekskluzive uzante la internacian lingvon Esperanto en ĉiuj aŭ kelkaj de viaj interkonaj retoj, kiel ekzemple Facebook, Twitter aŭ Google Plus. - Tiel, ni ĉiuj kune montru ke Esperanto estas ĉiutage taŭga lingvo. Legu pli: www.facebook.com/events/285403741638969/

### [Roskilde Festivalo 2014] Aliĝu jam por la sekva jaro!

*Malsukcesa elŝuto.*

### NI INVITAS AL STUDADO DE TURISMO, KULTURO KAJ LINGVOJ en la jaroj 2014/2015

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo Centro de Konstanta Edukado estas Klerigejo AKB/AIS funkcianta ekde 1991, laŭleĝe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 13/08). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB), Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz (UKW-UKG) kaj Muzeo de Diplomatio, Ekonomia Universitato en Bydgoszcz (WSG-EUB), Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodia Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo „Kujavio kaj Pomerelio”, Pola Esperanto-Asocio kaj Oficejo de Vojaĝantoj „Flugo”. En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan san-staton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj (simboloj de Eŭropa Unio). Legu pli: http://www.esperanto-studium.za.pl/

### Bona novaĵo neniam alvenas sola ĉe VINILKOSMO!!!

Ni havas 3 bonajn novaĵojn por anonci al vi!
La unua estas ke finfine la elŝutejo de VINILKOSMO finrekonstruiĝis...

Estis grandega laboro, multega horoj antaŭ la komputilekrano, de kiam ĝi estis fermita en marto post dua pirata atako... ĝis hodiaŭ! Legu pli: http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/756407

### Venontaj renkontiĝoj

87-a SAT-Kongreso 2014, Dinano (Francio), 9a ĝis 16a de aŭgusto 2014, http://www.satesperanto.org/

Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 9a ĝis 17a de aŭgusto, http://gresillon.org/s4

24-a KISO (Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝO) por „ludi, krei, sperti vin mem”, Marburg, Germanio, 10-a ĝis 17-a de aŭgusto 2014, http://www.esperanto.de/kiso

Muzikrenkontiĝo FESTO, Pont-de-Barret (26), Francio, 16a ĝis 23a aŭg 2014, http://www.alesk.eu/festo2014/eo

Somera Esperanto-Studado 2014, Mendeleyevo, Rusio, 17a ĝis 25a de aŭgusto, http://ses.ikso.net

SUNO KAJ MONTOJ - 81-a Itala Kongreso de Esperanto, Fai della Paganella, Trento, 23a ĝis 30a de aŭgusto 2014, http://kongreso.esperanto.it

Kultura semajnfino de CDELI kun André CHERPILLOD, La Sagne (NE), Svisio, Sabato-dimanĉo, 6a ĝis 7a de septembro 2014, http://www.cdeli.org/Eventoj-de-CDELI.html

25-a MontKabana Renkontiĝo (MKR), Sillian, Aŭstrio, 18-a ĝis 21-a de septembro 2014, http://keja.hr/mkr/aliĝu-al-mkr/

Post-Somera Komuna Kuirado en Laarne (Belgio, iom sude de Gento), 19a ĝis 21a de septembro 2014, http://www.pskk.be/

Tria Interlingvistika Silmpozio, Poznano, Pollando, 25a kaj 26a de septembro 2014, http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/simpozio2014.html

30-aj ARtaj KONfrontoj en Esperanto (ARKONES), Poznan, Pollando, 26a ĝis 28a de septembro, http://arkones.org

TORPEDO-9, 66a Studsesio (semajnfino pri Esperanto-instruado) + Esperanto-Filmfestivalo, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 2a ĝis 5a de oktobro, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de

TORPEDO 9: Herzberg im Harz, die Esperanto-Stadt, Germanio, 3a ĝis 5a de oktobro 2014. Detaloj pri la klerigofertoj, studmoduloj: http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

La 2-a Pakistana Junulara Kongreso de Esperanto, Lahore, Pakistano, 5a de oktobro 2014, https://www.facebook.com/events/525362537582468/

3a Junulara Somera Komuna Aranĝo (JuSKA), Jimaguayú, Kubo, 9a ĝis 12a de oktobro, Ariadna García Gutiérrez (arita_piscis14 ĉe yahoo.es)

Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo (SFERO), Vordemwald, Argovio, Svisio, 17-an ĝis 19-an de oktobro 2014, http://esperanto.ch/konkurso

2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), Germanio, 19a ĝis 24a de oktobro 2014 sur la migrovojo "Moselhöhenweg". http://www.esperanto.de/ema

AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj, Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 24a de oktobro ĝis 1a de novembro, http://gresillon.org/

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), Modra Harmónia, Slovakio, 13a ĝis 16a de novembro 2014, Peter Baláž (kaest ĉe ikso.net) kaj http://kaest.ikso.net/

67a GEA-Klerigado, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 12a ĝis 14a de decembro, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de

Komuna Seminario (KS33), Ho Chi Minh urbo, Vjetnamio, 26a ĝis 28a de decembro, vejo.vjetnamio ĉe gmail.com aŭ https://www.facebook.com/events/638292086208245

Festi jarfine proksime de Francio, Luksemburgio kaj Belgio : 13-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj NIS (Novjara Internacia Semajno), Bitburg, Germanio, 27-a de decembro 2014 ĝis la 3-a de januaro 2015, http://www.esperantoland.org/nr/#nr

6a JES, Weißwasser, Germanio, 28a de decembro 2014 ĝis 4a de januaro 2015,

https://www.facebook.com/junularaesemajno kaj baldaŭ en http://jes.pej.pl

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu